# La Bitbulteno 44

### FINALIZA EL PRIMER PERIODO DE INSCRIPCIÓN A LOS CONGRESOS DE JULIO

Como hemos informado en anteriores ocasiones, en la última semana de julio tendrán lugar en Madrid dos importantes congresos internacionales de esperanto: el Congreso Español de Esperanto (20- 22 de julio) y el Congreso internacional de profesores esperantistas organizado por la asociación internacional ILEI (21-28 de julio), y queremos recordar algo importante: el 31 de mayo termina el primer periodo de inscripción, con cuotas reducidas.

Recordamos que es posible apuntarse sólo a uno o a ambos. El programa del sábado por la tarde y el domingo se consideran comunes, y la cuota para ambos congresos es sólo un poco superior a la individual.

Hay que aclarar también que el Congreso internacional de ILEI no está destinado solamente a profesores, sino que están previstas muchas otras actividades culturales, a las que puede asistir cualquier esperantista que desee participar en un encuentro con personas de todo el mundo. Para muchos será un aperitivo del Congreso Universal que a continuación tendrá lugar en Lisboa, y de hecho se ha organizado un viaje común el mismo día 28 para las personas que quieran viajar a este encuentro en nuestro país vecino.

Prevemos la participación de personas de decenas de países. En el momento de redactar este texto ya se han inscrito casi 90 personas de más de una veintena de países y 4 continentes.

Las personas que deseen apuntarse pueden hacerlo, por medio del formulario en red, o rellenando el archivo que se puede encontrar en formatos doc y pdf. Es posible inscribirse hasta en el mismo encuentro, pero insistimos en que el próximo 31 de marzo finaliza el primer periodo para hacerlo, con cuotas más reducidas. Animamos también a apuntarse pronto para que los organizadores puedan planificar con más exactitud.

Puedes también seguirnos en los espacios recién creados en las redes sociales, Facebook y Twitter. Abónalas y mantente en contacto con nosotros.

### RESERVAS DE SERVICIOS DE LOS CONGRESOS DE MADRID

Se ha abierto también un formulario para reservar otros servicios relacionados con los Congreso esperantistas de Madrid. El más importante y urgente es el de alojamiento. La organización dispondrá de habitaciones en el complejo de residencias universitarias que serán la sede principal del encuentro: los Colegios Mayores de la Universidad Complutense de Madrid. Es importante reservar pronto porque disponemos de un número limitado de habitaciones. Las condiciones y precios figuran en esta dirección (en esperanto)


Las habitaciones se reservan preferentemente para las personas que deseen alojarse durante el periodo largo de 7 u 8 días. El precio incluye pensión completa (salvo el domingo). La organización prepará en breve un listado de hoteles recomendados, para las personas que deseen reservar por su cuenta, pero sin compromiso de reserva.

También se pueden reservar las dos comidas comunes previstas durante el Congreso, una correspondiente al Congreso Español y otra formal del Congreso de ILEI.

Ya se han concretado las excursiones turísticas del Congreso: una el domingo por la mañana a Alcalá de Henares y otras dos el miércoles respectivamente a Toledo y Segovia. También puede reservarse el viaje común a Lisboa, para asistir al Congreso Universal, el sábado 28 de julio, a la finalización del encuentro madrileño.

Los formularios de reserva de servicios se encuentran en esta dirección o pueden descargarse en formatos pdf o en doc.

Para cualquier duda se puede escribir al Comité Organizador a: kongreso2018@esperanto.es.



**SIGUE EN MARCHA EL CONGRESO INTERNACIONAL JUVENIL DE BADAJOZ**

A pesar de que a finales de enero terminó el primer plazo para apuntarse al Congreso Internacional Juvenil de Esperanto que este año tendrá lugar en Badajoz, continúan apuntándose jóvenes esperantistas que quieren participar en ese encuentro excepcional Ya hay 115 personas inscritas.

Ya tenemos un nuevo miembro en nuestro equipo que se preocupará del programa matutino y ayudará a organizar el programa en conjunto. Paulína es una activista en Praga que entre otras cosas, incluso ya ayudó a organizar el programa nocturno del apartado juvenil del Congreso Universal del 2016 en Nitra, y que forma parte del equipo del IJK 2019 en Liptovský Hrádok. Así Paulína colaborará para organizar existosamente el IJK 2018 y se llevará la experiencia para que el IJK 2019 sea perfecta.

Ahora el equipo está preparado para que puedas disfrutar muchísimo del IJK en Badajoz. Los participantes podrán escuchar charlas sobre psicología, relaciones internacionales, viajes... o participar en cursos de bailes, visitar la ciudad, aprender nuevos idiomas... ¡e incluso jugar batallas de globos de agua (para luchar contra el calor de forma divertida)!

La noche no se quedará corta. Contaremos con conciertos de música en esperanto (y con la de un grupo local en español) pero también con una obra de teatro, un karaoke y una película. Sin olvidar el imprescindible *gufujo* del IJK o la fiesta después de estos eventos.

Asi que, ¡no esperes más e inscríbete! También te animamos a colaborar en la organización. Puedes ponerte en contacto en las direcciones indicadas en esta web.

**OTRO ENCUENTRO ESPERANTISTA MÁS EN MADRID EN JULIO**

Otro encuentro esperantista internacional tendrá lugar en España en el verano: se trata de la acampada internacional organizada por la asociación Verdaj Skoltoj (Scouts Verdes), que tendrá lugar desde el sábado 28 de julio al 4 de agosto, en Los Molinos, región de Madrid. El lugar previsto puede verse en este enlace.

Las fechas se han elegido de forma que los jóvenes puedan participar a continuación en el Congreso Internacional de Badajoz, que comienza precisamente el 4 de agosto. Más información puede verse en la web de la asociación: www.verdajskoltoj.net.



**BUENOS FRUTOS DE LAS ACTIVIDADES EN GUARDAMAR DEL SEGURA**

Como informamos en nuestro anterior Bitbulteno, el grupo esperantista de Guardamar del Segura (Alicante) organizó en febrero diversas actividades, entre los cuales una exposición sobre el esperanto y la

participación en la Fiesta del Árbol, en homenaje al ingeniero forestal y pionero del esperanto Ricardo Codorniu.

Como resultado, un bello artículo sobre la actividad y el esperanto apareció en la prensa local... en alemán. Se trata de una revista para residentes en la zona, llamada "Costa Blanca Nachrichten". Puede verse el inicio del artículo en la web de la revista y el texto completo aquí.



**PRESENTACIÓN DE UN LIBRO EN ESPERANTO EN BLANQUERNA**

El 12 de marzo se presentó un libro en esperanto en un lugar muy prestigioso y significativo: el Centre Cultural Blanquerna de Madrid.

El libro era “Tagoj kaj ruinoj”, el diario escrito por el intelectual catalán Jaume Grau Casas durante su larga estancia en los campos de refugiados españoles en Francia tras la guerra civil y que ahora ha sido editada por la asociación "Izquierda y Esperanto SAT-en-Hispanio". La obra ya se había presentado ante el público esperantista en los Congresos Español y Catalán.

Esta presentación tenía como objetivo el público general. Blanquerna es una institución dependiente de la delegación en Madrid de la Generalitat de Cataluña. Por primera vez acoge una presentación de un libro en esperanto; normalmente las presentaciones son de libros en catalán o en castellano con relación a Cataluña, y en este caso se debe a la importancia del autor y su relación con Cataluña, entre otras razones como coordinador de la "Kataluna Antologio", una compilación de literatura catalana traducida al esperanto que tuvo gran éxito a comienzos del siglo XX.

El evento fue presentado por José Antonio del Barrio, presidente de la Federación Española de Esperanto, y en él intervinieron Miguel Fernández y Pedro Sanz, que hablaron sobre el autor, las circunstancias de creación del libro, la recuperación de los textos y la actual edición. La persentación puede verse (en castellano) en el canal de Youtube de Blanquerna.

**CARLINOS, LA SERIE, EN ESPERANTO**

“Carlinos, la serie” es una webserie protagonizada por 3 perros carlinos, únicos supervivientes de una guerra nuclear. Guiados por un extraño mensaje emprenderán un viaje lleno de aventuras.

La  serie ha sido traducida al esperanto, por el grupo que ha producido otras obras como las “Dek bovinoj”. Aquí puedes ver el tráiler, y aquí el comienzo de esta serie, de la que ya se han publicado cuatro episodios en esperanto.

Puedes colaborar en la financiación de la serie en la página https://patrocinam.com/proyecto/carlinos-la-serie220/




**ÚNETE A LOS JÓVENES ESPERANTISTAS**

La sección juvenil, HEJS, necesita tu apoyo y tu colaboración. Si eres menor de 30 años, aquí puedes encontrar compañeros con los que compartir buenos momentos practicando el esperanto. Además, queda mucho por hacer y tu colaboración siempre será bienvenida.

Si quieres apuntarte, puedes usar el formulario en red o la hoja de inscripción, o simplemente puedes escribir a

hejs@esperanto.es

. Ser miembro de HEJS tiene además algunas ventajas pero en cualquier caso puedes contactar con nosotros simplemente para participar en nuestras actividades.

Anímate, este año tenemos un montón de planes.

**FINIĜAS LA UNUA ALIĜPERIODO DE LA MADRIDAJ KONGRESOJ**

En la lasta semajno de julio okazos en Madrido du gravaj internaciaj renkontoj de Esperanto: la Hispana Kongreso de Esperanto (20- 22 de julio) kaj la Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj organizita de ILEI (21- 28 de julio). Atentu ke la 31-an de marto finiĝas la unua aliĝperiodo de ambaŭ renkontiĝoj!

La eventojn eblas ĝui samtempe aŭ aparte, depende de via ŝato kaj via tempo, ĉar la programerojn de la sabata vespero kaj la dimanĉo oni konsideros komunaj kaj la kuna kotizo por ambaŭ kongresoj estas nur iom pli kosta ol ĉiu aparte.

La kongresoj okazos en la universitata areo de Madrido. La ĉefa sidejo estos la universitata rezidejo (hispane: "Colegio Mayor") Teresa de Jesús, apartenanta al la komplekso de rezidejoj de la Universitato Complutense. Multaj el la aktivadoj de la kongreso ILEI disvolviĝos en la Fakultato de Filologio de la Nacia Universitato pri Neĉeesta Edukado (UNED).

Indas klarigi ke la kongreso de ILEI celas ne nur Esperanto-instruistojn, sed ke temos pri vere internacia kongreso, en kiu multaj aliaj kulturaj kaj distraj programeroj estas antaŭvidataj. Por multaj, ĝi taŭgos kiel antaŭgustumo de la Universala Kongreso kiu la sekvan semajnon okazos en Lisbono. Fakte, komuna vojaĝo estas organizata el Madrido al tiu ĉi evento, la 28-an de julio mem.

En tiu ĉi momento jam aliĝis preskaŭ 90 homoj, venantaj el pli ol 20 landoj kaj 4 kontinentoj. Memoru ke eblas aliĝi per tiu ĉi reta formularo, aŭ pere de la aliĝiloj troveblaj en formatoj doc kaj pdf.

ESPERANTO KAJ EDUKADO

**EBLAS MENDI LA SERVOJN DE LA KONGRESOJ EN MADRIDO**

Ankaŭ disponeblas jam formularo por mendi servojn de la kongreso. La plej grava estas la loĝado: ni disponos je ĉambroj en la universitata rezidejo, sed la nombro estas limigita, kaj indas rezervi sufiĉe antaŭe. La rezervojn oni prioritatigas por la restado dum 7 aŭ 8 tagoj, kaj ĝi inkludas tri manĝojn tage (krom en dimanĉo, kiam alia solvo estas antaŭvidata)

Ankaŭ eblas mendi la ekskursojn. Dimanĉe matene ni vizitos la universitatan kaj historian Alcalá de Henares, naskourbon de Miguel de Cervantes. Por la merkredo ni organizis respektivajn vizitojn al la famaj kaj proksimaj urboj Toledo kaj Segovio, ambaŭ kun granda historia graveco.

La mendilo (kiu ankaŭ inkludas la du komunajn bankedojn kaj la vojaĝon al Lisbono) troviĝas en tiu ĉi formularo, kaj elŝuteblas ankaŭ en pdf kaj doc formoj. Por ĉiu dubo, ne hezitu skribi al la LKK.

Vi krome povas sekvi la novaĵojn en la nun kreitaj spacoj en la sociaj retoj, Facebook kaj Twitter. Abonu ilin kaj restu en kontakto kun ni.

**ANTAŬENIRAS LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN BADAJOZ**

Eĉ se en januaro finiĝis la unua aliĝperiodo por la Internacia Junulara Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en la ekstremadura urbo Badaĥozo (Badajoz), plu aliĝadas esperantistaj junuloj el la tuta mondo. Jam enskribiĝis 115 homoj ĝis nun.

Organizantoj trovis novan teamanon kiu zorgos pri la taga programo kaj helpos nin organizi la tutan programon. Paulína estas aktivulo el Prago kiu eĉ jam helpis la organizadon de la vespera programo de la junula programo dum UK 2016 en Nitro, kaj kiu apartenas al la teamo de la IJK 2019 en Liptovský Hrádok. Do, ŝi decidis helpi la hispanianojn kaj samtempe pretigi sian laboron por la venontjara renkontiĝo.

La partoprenontoj povos aŭskulti prelegojn pri psikologio, internaciaj rilatoj, vojaĝoj… aŭ partopreni dancokursojn, viziti la urbon, lerni novan lingvojn… eĉ ludi batalon per akvoglobetoj! La nokto ne estos malpli mojosa. Ni organizos koncertojn de Esperanta muziko (kaj ludos loka grupo en la hispana) sed ankaŭ teatraĵon, karaokeon kaj filmon. Sen forgesi ke la ĉiam okazanta gufujo de la IJK aŭ la posta

festumado ankaŭ okazos.

Ne hezitu! Partoprenu, kaj, se vi estas juna, vi ankaŭ povas kunlabori en la organizado. Vi povas kontakti nin per la adresoj listigataj en tiu ĉi retejo.

## NOVA RENKONTO EN MADRIDO EN JULIO

Alia internacia esperantista renkonto okazos en Hispanio en somero: temas pri la tendaro organizata de la Verdaj Skoltoj. Ĝi okazos ekde sabato la 28-an de julio ĝis sabato la 4-an de aŭgusto, en Los Molinos, proksime al Madrido, en tre komforta loko, kies retejo kun fotoj estas vizitebla ĉe tiu ĉi ligilo.

La datoj estas elektitaj tiel ke junuloj povos poste viziti la Internacian Junularan Kongreson, kiu komenciĝos en Badajoz ĝuste ekde la 4-a de aŭgusto. Pliaj detaloj ĉe: www.verdajskoltoj.net.

## BONAJ FRUKTOJ DE LA AGADO EN GUARDAMAR DEL SEGURA

Kiel ni informis en la pasinta Bitbulteno, la esperantista grupo de Guardamar del Segura (provinco Alikanto, Valencilando) organizis diversajn aktivadojn dum la monato februaro, inter ili ekspozicion pri Esperanto, kaj ili partoprenis ankaŭ en aktivado ĉirkaŭ la festo de la arbo, kun la celo inaŭguri esperantistan eko-literaturan bosketon omaĝe al la esperantista pioniro Ricardo Codorniú.

Bela artikolo pri la agado kaj pri Esperanto aperis... en la germana. Temas pri gazeto por germanlingvaj rezidantoj en la t.n. Blanka Marbordo, nomata "Costa Blanca Nachrichten". Vidu la komencon en la retejo de la revuo kaj la tutan tekston tie ĉi.




## LIBROPREZENTADO EN PRESTIĜA KULTURCENTRO

La 12-an de marto estis prezentita esperanta libro en prestiĝa kaj signifoplena loko: la kulturcentro Blanquerna de Madrido.

La libro estis "Tagoj kaj ruinoj", taglibro verkita de la kataluna esperantista intelektulo Jaume Grau Casas dum lia plurjara restado en prizonkoncentrejoj en la sudo de Francio post la hispana interna milito, kaj eldonita de SAT-en-Hispanio. La libro jam estis prezentita antaŭ esperantista publiko en la Hispana Kongreso en Teruelo kaj poste en la Kataluna Kongreso.

Tiu ĉi prezentado celis eksteresperantan publikon. Blanquerna estas institucio dependa de la delegacio de la registaro de Katalunio en Madrido. Ĝi unuafoje gastigis prezentadon de libro en Esperanto; kutime la libroj prezentataj estas en la kataluna aŭ la kastilia kun rilato al Katalunio, kaj en tiu ĉi kazo la graveco de la verkisto kaj lia rilato al la kataluna kulturo (li estis interalie la ĉefredaktisto de la *Kataluna Antologio*, tre sukcesa eldono en la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento) ebligis tiun ĉi eksterordinaran gastigon.

La eventon prezentis José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kaj en ĝi partoprenis Miguel Fernández kaj Pedro Sanz, kiuj rakontis pri la aŭtoro, la cirkonstancoj de la verkado, la retrovo de la tekstoj kaj la nuna eldonado. La tutan prezenton eblas spekti en la kanalo de Jutubo de la kulturcentro Blanquerna.




## MOPSOJ, LA RETSERIO, EN ESPERANTO

“Mopsoj” estas retserio kies ĉefroluloj estas tri mopsoj (hundoj), solaj survivantoj de nuklea milito, kiuj entreprenas vojaĝon plenan je aventuroj.

La serio estas tradukata al Esperanto de la grupo respondeca interalie de la furora “Dek bovinoj”. Vi povas spekti tie ĉi la reklamfilmeton, kaj tie ĉi la komencon de tiu ĉi serio, el kiu aperis jam kvar epizodoj en Esperanto.

Oni povas krome kontribui al la financado de la serio en la retpaĝo https://patrocinam.com/proyecto/carlinos-la-serie220/

**KUNLABORU KUN HEJS**

Nia junulara sekcio, la Hispana Esperantista Junulara Societo, bezonas vian apogon kaj kunlaboron. Se vi aĝas malpli ol 30 jarojn, tie ĉi vi povas trovi kunulojn, kun kiuj pasigi bonajn momentojn praktikante Esperanton. Krome, estas multo farenda en nia komunumo, kaj via kunlaboro estos ĉiam bonvena.

Se vi volas aliĝi al ni, vi povas uzi la retan formularon aŭ la aliĝfolion, aŭ simple skribu al adreso hejs@esperanto.es. Esti membro de HEJS havas krome kelkajn avantaĝojn, inter kiuj la partoprenon en internaciaj programoj subvenciataj, sed ĉiukaze vi povas kontakti nin simple por partopreni niajn aktivadojn.

Ek! Tiun ĉi jaron ni havas amason da ideoj kaj planoj.